

Intelekta Maratono en Odeso



Facila

KOMPLEZE DE A. ANDROSOV

Tatjana Auderskaja, Ukrainio

“Ni dis-batu niajn malamikojn inter (...) kaj (...)!” – alvokis Aleksandr Ipsilanti, gvidanto de patruj-liberiga **sekreta** asocio de grekoj en la jaro 1814”. La preter-lasitaj vortoj estas du nomoj de la lokoj de nacia famo de greka popolo. Kun ĉiu el tiuj nomoj estas kun-ligita iu nombro. Bonvolu diri tiujn nombrojn.

Ĉu vi komprenis, pri kio temas? Estas **intelekta** ludo, okupo de multaj gejunuloj de eksa Sovetunio. Pri tiuj ludoj okupiĝas miloj kaj dekmiloj en nia lando kaj en aliaj landoj, kien foriris nia intelekt-ularo post la dis-falo de nia patrujo. La internacia lingvo de tiuj ludoj estas la rusa.

Ĉu vi jam komprenis, pri kiuj nombroj temas? Jes, la nomoj estas urbo Maratono kaj Termopilo, kaj la nombroj – 42.195 kaj 300, tio estas la **maratona** longo 42.195 metroj kaj 300 spartanoj, kiuj defendis la Termopilan paŝejon. Ne tre malfacila kaj bela demando,

por solvi kiun oni bezonas nur sciojn de historio... kaj iom da intelekta lerteco. Certe, ĉiuj scias pri maratona kuro kaj fama batalo de reĝo Leonido. Sed intelektaj ludoj (IL) bezonas kaj ekzercas ne instruit-econ (kvankam ankaŭ ĝi estas ofte bezonata), sed liberon de pensado, mensan **flekseblecon**, kapablon kompreni ligojn inter plej diversaj aferoj kaj agoj; ili plivastigas niajn mensajn limojn kaj instruas ne halti antaŭ imagitaj limoj kaj baroj. “Vi scias, vi povas tion!”, – jen mesaĝo de tiuj ludoj, kiujn ni nomus “ludoj de plen-pova intelekto”, ĝuanta sin mem kaj sian forton. En nia **mikroskope analizema** tempo ili estas penego al tut-pova **sintezo**, kiun tiel bezonas la mondo.

Do, maratono. Ĉu nur 42.195 metroj? Ne, en Odeso, kiun oni foje nomas ankaŭ intelekta ĉef-urbo de Ukrainio, okazas ankaŭ Intelekta Maratono. La demandojn, similajn al la supra, oni respondadas dum sufiĉe longa

tempo sen-inter-rompe. La ideo venis al juna odesano, tiam sukcesa DJ Aleksandr Androsov, antaŭ kelkaj jaroj. La unua maratono konsistis el nur 100 demandoj; la dua – el 200. La tria Odesa Intelekta Maratono en 2002 daŭris tag-nokton, kaj konsistis el ĉ. 600 demandoj; partoprenis ĝin ĉ. 60 **teamoj** el 19 urboj de 5 ŝtatoj. En la kvara Maratono oni dum 28 horoj kaj 15 minutoj respondis 1001 demandojn; ĝi estis dume la plej longa el ĉiuj. La kvina Maratono estis plena je **eksperimentoj**: kaj antaŭa elekto per la **interreto**, kiam teamoj devis dum du monatoj solvadi po unu demandon tage kaj respondi interrete; kaj speciale aranĝitaj demandosekvoj. Jen estis centoj de tre simplaj demandoj, sed respondo estis bezonata post 30 sekundoj (ni forgesis diri, ke por ĉiuj demandoj de la Maratono, kaj entute de intelektaj ludoj, la respondotempo estas unu minuto, por komuna pripensado de seskapa teamo), jen centoj de aparte malfacilaj demandoj (“por ripozo de la juĝ-antaro”), jen centoj de demandoj, verkitaj de virinoj...

Interalie, interesa afero: por la ludo, kiu konsistas el respondoj al demandoj, oni devas ja havi tiujn demandojn! Por ludi 1001 demandojn, oni devas havi 1001 demandojn – sed de kie? Vi vidis jam, ke la demandoj de niaj intelektaj ludoj ne estas simplaj demandoj “Kio? Kie? Kiam?”. Kvankam la plej fama intelekta ludo en nia regiono nomiĝas ĝuste tiel, la demandoj estas same produktoj de alte kreema kaj fleksebla menso; ili bezonas saman aŭ eĉ pli akran kaj fortan **racion**, instruitecon, kapablon sintezi, vidi komunajn ecojn en ŝajne neniel proksimaj objektoj. Kreado de demandoj estas tre komplika kaj malfacila laboro; fakte, ĉiu

ludanto povas verki demandon, ĉar li/ŝi laŭ sia propra sperto scias, kia devas esti bona demando. Sed ne ĉiuj kapablas. Ankaŭ por tio bezonatas speciala kapablo, kaj ekzistas elstaraj “demandistoj”, kiujn la tuta ludanta mondo akceptas kiel tiajn. Kaj, kompreneble, ili mem estas spertaj ludantoj, ĉar ne eblas verki bonan demandon, se oni ne trasentas ĝis-oste tiun samtempe **pasian** kaj racian ludon.

En la interreto ekzistas multaj interretejoj por ludantoj: <http://znatoki.kulichki.net>, www.chgk.info, www.chgk.msk.ru, www.library.narod.ru, www.krylenko.com/chgk (ĉiuj en la rusa) kaj multaj aliaj. Multaj ludoj okazas interrete; en la t.n. “Demandejo de Stepanov” troviĝas pli ol dek mil demandoj, kiujn oni iam ajn ludis en iuj ajn multaj intelektaj ludoj. Kaj la okazoj por intelektaj ludoj same multas, kiel eventoj en Esperantujo: ĉiumonate en nia landaro kaj apude okazas 10-15 intelektaj ludoj. Ekzemple, la kvara Mond-**ĉampionado** pri IL okazis ĉi-julie en Kaliningrado...

Sed ni parolas pri la Maratono, kiu estas pure odesa ideo. Interalie, oni proponis, ke nia Odesa Intelekta Maratono eniru la libron de Guinness, ĉar la evento estas vere unika. Oni jam sendis la vid-**bendon** kaj al-iĝ-ilojn, kaj nun oni atendas la respondon de la komitato de la Libro.

La sesa Intelekta Maratono okazis en Odeso la 27-28-an de majo, 2006, en multekosta manĝejo de la Mar-haveno. La apartaĵo de multaj intelektaj ludoj estas, ke homoj devas pensi kune, kaj poste noti sian respondon; do, bezonatas io, sur kio oni povas meti la paperon por skribi... Ludantoj solvis tiun problemon:



bezonatas tablo kun ses seĝoj! Tial la ludoj ĉiam okazas en la ejoj kun tiuj aĵoj. Ne pensu, ke ni manĝegas! La kvin-minutaj inter-rompoj okazas post ĉiuj cent demandoj (ĉ. kvar horoj); do, manĝado de alportitaj buter-panoj kaj trinkado okazas samtempe kun streĉa cerba laboro, kaj unu tute ne malhelpas la alian! Ja *“homini sumus, et nihil humani a nos alienum est”***.

Ĉi-jare ludis nur teamoj, elektitaj dum antaŭa interreta konkurso; el la 40 elektitaj teamoj venis 36, el Ukrainio, Rusio kaj Moldavio. Sonis 555 demandoj, kaj la juĝistaro pri-laboris 555x36=19980 respondojn! Ĉio daŭris de la 11-a matene ĝis la 8-a matene sekva-tage. Gajnis la miksitaj teamo “Średinbag” (Moskvo –

Sankt-Peterburgo – Odessa); la duan lokon dividis teamoj el Odeso kaj Simferopolo (Krimeo, Ukrainio). La teamo “Feniks”, kiu duone konsistas el anoj de la Odesa junulara Esperanto-klubo “Verdaĵo”, okupis ne-mal-estim-indan 24-an lokon. (Kvankam reale estis 22-a loko, ĉar antaŭ ni oni dividis du lokoj inter du teamoj. Sed fakte, tio tute ne gravas. La venkintoj havas 395 poentojn, ni – 230. Sed la ĝuo pro la ludo estas ne-mezur-ebla!)

Nia klubo jam de antaŭ-longe okupiĝas pri IL, ankaŭ en Esperanto. Inter-alie, en la ttt-ejo de Odesa Klubo de Intelektaj Ludoj <www.erudit.odessa.net> (rus-lingve) vi povas trovi paĝon pri nia klubo “Verdaĵo”. Fine de 2004 kaj



komence de 2005 Intelektaj Ludoj okazis en la interreto, por esperantistoj de kelkaj landoj. Unu el tiuj ludoj vi povas vidi en la ttt-ejo <www.ludoj.narod.ru>, kaj, se vi komprenas la rusan – eĉ provi solvi ĝin. Eble ĉi tiel pli multaj personoj aliĝos al tiu belega mondo de kulturita ĝuo, kiu nomiĝas Intelektaj Ludoj.

- analizi** – detale esplori per “diga metodo” (malo de sintezo)
- bendo** – mallarĝa kaj longa peco de maldika materialo
- eksperimento** (ĉi tie) – io nova, kion oni ne faris antaŭe
- ĉampionado** – la ĉefa, plej grava ludo
- flekso** – mal-rekt-igi; (ĉi tie): fleksebleco – [mensa] lerteco
- intelektito** – kapablo pensi
- interreto** – aro de inter-ligitaj komputiloj
- konkurso** – antaŭ-aranĝita

- “batalo”
- maratono** – konkursa kurado
- mikroskopo** – ilo, kiu pligrandigas la bildon de malgrandaj objektoj por pli facile vidi ilin
- pasia** – sentoplana
- racio** – tiu parto de la menso, kiu ebligas al homoj kompreni la naturajn leĝojn kaj uzi ilin por sia bono
- sekreta** – kaŝita
- sintezo** – metodo trovi unuecon per “kun-iga metodo” (malo de analizo)
- teamo** – aro da homoj, kiuj ludas kune


Tatjana Auderskaja estas gvidantino de la junulara Esperanto-klubo “Verdaĵo”, Odeso, Ukrainio

* homoj ni estas kaj nenio homa fremdas por ni (de la latina)

Pli da informoj pri la evento troviĝas ĉe <www.marafon.com.ua>

Anonce

La unua Esperanto-lernolibro en la telugua*!



B. Purushotham, Hindio

En la jaro 2005 aperis la unua lernolibro de la internacia lingvo en la telugua lingvo – “Mond-lingvo – Esperanto”, adaptita de *The Esperanto Teacher* (de M. Stuttard, 1954) fare de G. K. Vijayakumar kaj eldonita de Federacio Esperanto de Barato. Ĝi havas 120 paĝojn kaj kosta ses eŭrojn.

La lokanoj, kiuj konas nur teluguan, trovas lernadon de Esperanto per sia lingvo

vo tre facila. En la antaŭa tempo oni povis lerni Esperanton nur per la angla, kaj tio estis ege malfacila – fakte, lernado de la angla estas devigo por la telugu-lingvanoj. Nun ili havas lernolibron en sia lingvo, do, ili povas lerni Esperanton rekte.

La libro konsistas el 20 lecionoj, kiuj klarigas Esperanto-gramatikon en la telugua. Ĉiun lecionon kompletigas vortolisto, tre utila por la ekzercoj. Ankaŭ la traduk-ekzercoj estas donitaj en la telugua. En la fino de la libro estas vortaro, tre utila por la studentoj. Ankaŭ kelkaj modeloj de leteroj la telugu-lingvaj lernantoj trovos tre utilaj. Ĝenerale la libro estas tre bona, kaj ĝi tre faciligas la lernadon de Esperanto por telugu-lingvanoj.

La libro haveblas de FEB (Federacio

Esperanto de Barato) laŭ la adreso 5, Archana Corner, Salunke Vihar Road, Khondwa, Pune, Maharashtra, Hindio. Retpoŝto: <helpo@vsnl.com>.

* La telugua lingvo estas unu el la lingvoj de Hindio. Ĝi estas parolata en la ŝtato Andrapradeŝo, kie ĝi estas la oficiala lingvo. Oni ankaŭ parolas ĝin en Yanaon (Pondichéry), en Tamulio, en Karnataka, en Maharaŝtra kaj en Orissa. Oni trovas parolantojn en Birmo, en Malajzio, Maŭricio, Saud-Arabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, Sudafriko, Fiĝioj, Norda Ameriko kaj Eŭropo. Ĝi estas la gepatra lingvo por 69 milionoj da parolantoj.